

28a jarkolekto - novembro 2007/11

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijs - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Por egalrajteco en Belgio

**Lluís M. Xirinacs,
pace vivi, pace morti**


**La vualo,
romantika kaj erotika**



Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Separismo ne, egalrajteco jes

La lingva kaj kultura diverseco de Belgio ofte kreis politikajn aŭ kulturajn konfliktojn, kaj respondas pri la komplika registara sistemo aŭ la longa historio de la ŝtato. Ofte Belgio bezonas miraklojn, por ke flandroj kaj valonoj havu saman starpunkton. Separismo tute ne estas la kaŭzo de la konflikto, sed jes egalaj rajtoj por ĉiuj belgoj.



8

POLITIKO

Belgio	8
Separismo ne, egalrajteco jes	
Honkongo	11
„Migranta filo” post 10 jaroj	
Albanio	12
Krizo solvita	
Opinio	12
Sonĝante pri gulaŝo	
Japanio	13
Ŝokega rezulto	

MODERNA VIVO

Irlando	14
De rubaĵdeponejo al trafikcirklo	
Katalunio	15
Pace vivi, pace morti	
Virinoj	16
Ŝanĝiĝu nia propra sinteno	
Nepalo	16
[F]ina venko	
Portugalio	17
Kie la beboj?	
Ukrainio	17
Ido-krizo	
Albanio	18
Pri ŝtupoj kaj supoj	
Togolando	18
Kurenta krizo	

KOMPUTADO

Sociaj retoj	19
Ĉio en unu programo	

SPIRITA VIVO

Moroj	21
La vualo, romantika kaj erotika	

EKONOMIO

Urbegoj	23
Urbiĝo kaj malriĉiĝo	

LIBROJ

Bele prezentita romano	25
Ezop(ec)aj fabloj el Japanio	26

Abonoj	4
Enkonduko	5
Leteroj	6
El mia vidpunkto	7
Anoncetoj	27

Pace vivi, pace morti

Lluís M. Xirinacs, estis pacisma politikisto kaj eks-sacerdoto, kiu fariĝis simbolo de la lukto por amnestio en la postfrankisma epoko. Estante kandidato por Nobelpremio pri paco en 1975, 1976 kaj 1977, Xirinacs elstaris pro siaj malsatstrikaj kaj neperfortaj protestoj. En aŭgusto, maljuna kaj malsana, translokiĝis en la montaron por sole, pace kaj silente forpasi.



15

Ĉio en unu programo

Ipernity nomas sin mem la „ĉio-en-unu” de la Reto 2.0. Ĉiu uzanto de la retejo povas prezenti sin mem al la mondo, aŭ al memdifinita grupo amika aŭ familia, pere de tekstoj, la tiel nomata blogo, pere de memfaritaj bildoj, filmoj aŭ sonregistraĵoj, aŭ per kombino de ĉio ĉi. Jam ekzistas retejoj, kie oni povas kolekti kaj montri siajn fotojn; estas aliaj, kiuj arigas filmetojn; en ankoraŭ aliaj oni povas havi sian propran blogon. Ipernity havas ĉion „sub unu tegmento”. Tiu ĉi koncepto estas tute nova.

19

La vualo, romantika kaj erotika

Ĉar la aŭtoro dumlonge alterne loĝadis en urboj kaj en kamparoj de pluraj arabaj landoj kaj vojaĝadis tra arabaj kaj islamaj landoj, ofte kun vigla observado de arabo-islamano, kiu ankaŭ iom spertis „la alian flankon” de la mondo, tial prosperis iel imagi, kiamaniere oni pratempe komencis uzi la vualon en Arabio kaj kiajn gravon kaj funkcion ĝi ankoraŭ havas por multaj loĝantoj.



21

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5	9
Britio	GBP	34	37	20,4	4	6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5	9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5	9
Danio	DKK	365	395	219	40	70
Estonio	EUR	25	29	15	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5	9
Grekio	EUR	45	49	27	5	9
Hispanio	EUR	45	49	27	5	9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5	9
Hungario	EUR	25	29	15	5	9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860	1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9	15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5	9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5	9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5	9
Kroatio	EUR	25	29	15	5	9
Latvio	EUR	25	29	15	5	9
Litovio	EUR	25	29	15	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	33	37	19,8	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	390	430	234	45	71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10	18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5	9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5	9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5	9
Slovakio	EUR	25	29	15	5	9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5	9
Svedio	SEK	460	495	276	49	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5	9
Usono	USD	69	75	41,4	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighill Road, Kilmadzw, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto MONATO: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervang 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceraise, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: fesp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolsenskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm-mail.telialia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telialia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.



Bizara lando

La silaboj „mjan” kaj „ma” (aŭ „mar”) en la birma lingvo signifas „forta” kaj „rapida”. Ĉar ili mem karakterizas sin tiel, la generaloj de la lando post la puĉo en 1989 per dekreto ŝanĝis la nomon de la ŝtato al „Mjanmao”, do „Fort-Rapido”. Mi ne scias, ĉu en via lando oni adoptis tiun bizaran nomon kaj do en septembro, kiam mondvaste oni raportis pri ribelado de monaĥoj, vi legis kaj aŭdis la landnomon Mjanmao aŭ Birmo. De post la 6a jarcento tiel nomiĝis la azia lando, kaj nur malmultaj aliaj ŝtatoj (inter ili Germanio), kaj UN adoptis la arbitran nomŝanĝon de la diktatoroj. Tamen en Germanio la amaskomunikiloj ne sekvis sian registaron kaj daŭre parolas kaj skribas pri Birmo, same kiel la birma opozicio. Iuj germanaj amaskomunikiloj elturniĝas per „Mjanmao, iama Birmo”. En angla-lingvaj landoj kaj en Svislando, cetere, la lando estas „Burma”. Konfuza do estas la situacio.

Ŝanĝoj de landnomoj ne estas oftaj, tamen okazas. El insulo Formozo ekzemple iĝis (la nova ŝtato) Tajvano. Iama Siam nun estas Tajlando kaj Sri-Lanko antaŭe nomiĝis Cejlono. En Afriko pluraj landoj post la sendependiĝo forigis nomojn altruditajn de koloniĉefoj kaj elektis tradiciajn nomojn. Tion oni kompreneble povas kaj devas respekti. Nia redakcio sekvas la principon, ke la loĝantoj de lando rajtas mem decidi, kiel ili nomas ĝin. Tial ni ankaŭ adoptis la nomon Barato anstataŭ Hindio, laŭ la deziro de barataj esperantistoj. Sed en la okazo de Birmo ni, pro demokratiaj principoj, ne povas akcepti la diktatoran dekreton de nomŝanĝo, des pli ke la demokratoj tie mem rifuzas ĝin. Tiu ĉi nia morala subteno certe ne ŝanĝos la situacion, sed ĝi estu esprimo por nia deziro, ke iam la birma popolo venku kontraŭ la subpremo fare de la fortaj kaj rapidaj generaloj!

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Noto:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Ornamita per malĝusta aŭtoro

La aŭtoro de la artikolo *Ornamitaj manuskriptoj* (MONATO 2007/8-9, p. 26-27) estis ne mi, sed mia edzino Máire McKay. Pri manuskriptoj kaj arkeologio mi ne estas fakulo!

Garbhan MACAOIDH
Irlando

La tri turoj de MKC (6)

Husejn Al-Amily (MONATO 2007/6, p. 6) listigas okazojn, en kiuj ŝtato komplete planas atakojn kontraŭ propraj instalaĵoj por akuzi aliajn pretekste por ataki ilin. Mi aldonas unu plian, kiu estas la dua tiaspeca faro de Hitler. Temas pri la bruligo de la Reichstag (parlamento) en Berlino la 27an de februaro 1933 fare de nazioj, pro kiu estis akuzitaj la tri bulgaraj ŝtatanoj Georgi Dimitrov, Vasil Tanev kaj Blagoj Popov kaj la germano Ernst Torgler, kiuj estis arestitaj kaj juĝitaj de la imperia tribunalo en Lejpcigo de la 21a de septembro ĝis la 23a de decembro 1933. Kun ili estis akuzita la nederlandano Marinus van der Lubbe, kiu estis poste ekzekutita de nazioj.



Dum kontraŭproceso en Londono en septembro 1933 estis pruvite, ke la bruligo de la Reichstag estis faro de nazioj. Estas tamen aliaj pruvoj, kiuj fariĝis konataj poste. En sia 48-paĝa raporto la germana eksperto prof. Emil Josse, al kiu la juĝesploristo komisiis esplori la teknikan flankon de la evoluo de la incendio, konkludis, ke la konstruaĵo, kiu havas amplekson de pli ol 10 000 m³, ne povas esti bruligita de nur unu homo per torĉo, ke por tio estis uzitaj likvaj brulaĵoj.

En siaj atestoj la supera direktoro de la berlina fajrobrigado Walter Gempp ekskludis, ke Van der Lubbe povis sola kaŭzi la incendion, ke la preparo de la incendio postulis longan tempon kaj estis farita de kelkaj personoj. Necesis minimume 20 kg da likva brulaĵo. Gempp estis arestita kaj strangolita en sia ĉelo, por ke li ne denuncu la efektivajn bruligintojn.

Estas konservita letero de Karl Ernst, komandanto de sturmtaĉmento, murdita la 30an de junio 1934 laŭ ordono de Hitler. Jen citaĵo el la letero: „Ni decidis, ke van der Lubbe devas eniri tra fenestro de la restoracio. Mi kaj miaj kamaradoj estis vestitaj en ŝuoj kun gumaj plandumoj. Ni ŝmiris la seĝojn kaj la tablojn per fosforo kaj surverŝis la kurtenojn kaj la kanapojn per petrolo. Poste ni ekbruligis en kelkaj lokoj en la kunsida salono kaj en la salono de imperiestro Vilhelmo. Je kvarono post la 9a ĉio estis finita kaj ni eliris. Van der Lubbe estis certa ĝis la lasta momento, ke li agas sola ...”.

Dimitar HAĜIEV
Bulgario

Samseksemo en la Biblio

Filippo Franceschi (MONATO 2007/8-9, p. 6) pravas pri la „pafado” de la rom-katolikaj eklezioj kontraŭ gejoj. Mi ĝojas raporti, ke iuj pastroj de la anglikana eklezio estas pli toleremaj. Antaŭ nelonge la vicdekano de la katedralo de Chester sin turnis al la Biblio kaj prelegis pri samseksaj rilatoj tie, malgraŭ kelkaj versoj en Levidoj kaj la Epistoloj. Li priskribis Davidon kaj Jonatanon kiel du virojn „pasioplene enamiĝintajn” kaj la libron Rut kiel la grandan amaferon de la Biblio, rakonton pri amo inter du virinoj.

William H. SIMCOCK
Britio



Ne malvarma, sed varmega

Bedaŭrinde, en mian artikolon pri Korczak (MONATO 2007/8-9, p. 16-17) enŝteliĝis grava eraro. Por substreki la suferojn de la infanaro forpelita matene la 6an de aŭgusto 1942 mi menciis, ke ili devis marŝi tra la stratoj „dum terure varmega tago”. Mi ne scias, kial la redaktoro ŝanĝis tion al „dum terure malvarma tago”. Nekomprenebla por mi eraro, ĉar ja en aŭgusto neniam en Pollando okazas tre malvarmaj tagoj ...

Zofia BANET-FORNALOWA
Pollando

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Superflua rapidego

de Stefan MAUL

En la jaro 1934 germana inĝeniero Hermann Kemper akiris patenton por „tubo-trajno” kun magnetŝveba tekniko, sed praktike nur fakulojn interesis tiu invento. Tamen ĝi ja estis fascina: trajno, kiu ne havas radojn, per magneta povo ŝvebas sur betona vojo kaj povas atingi grandan rapidon. Nur en 1969 fine la germana ministrejo pri trafiko mendis ekspertizon pri la eblo konstrui tian trafikilon. Sed daŭris ĝis 1980, kiam fine oni komencas konstrui testvojn.

La esploroj estis promesplenaj: la nova trafikilo (nun kun la nomo „Transrapid”) taŭgis por longaj distancoj, ĉar ĝi atingis rapidon de ĉirkaŭ 500 km/h, do ne malpli ol aviadilo, sed havis multajn avantaĝojn kompare al ordinara ekspres-trajnoj kaj aviado. Precipe ĝi ne poluis la aeron. Do en 1994 la germana registaro decidis konstrui trakon inter Berlino kaj Hamburgo (292 km).

Tro kosta

Tamen ju pli konkretaj iĝis la planoj, des pli kreskis la skeptiko kaj fine oni konstatis, ke tiu trajnvojo estus tro kosta kaj ne altirus sufiĉe multajn pasaĝerojn. Oni entombigis la projekton, sed planis novajn en 2000. Unu projekto estus 80 km longa trako en industri-regiono de Nord-rejn-Vestfalia, alia kun nur 37 km estus ligo inter Munkeno kaj ties flughaveno. En 2001 fine oni vere komencis konstrui transrapid-trakon – en Ĉinio, en Ŝanhajo; ĝi ligas la centron kun la flughaveno (30 km). Ĝi funkcias ekde decembro 2003; en 2006 oni decidis plilongigi la trakon.

Kontraste en Germanio oni rezignis pri la projekto en Nord-rejn-Vestfalia; ankaŭ tiu trako estus tro kosta kaj ne utila. Same tro kosta estus, laŭ plej multaj

fakuloj, la trako en Bavario. Sed la bavara ministro-prezidanto Edmund Stoiber [ŝtojber] insistis pri „sia” projekto, ĉar laŭ la plano oni atingus la flughavenon de la fervoja ĉefstacidomo ene de nur 10 minutoj, kontraste al nun 42 minutoj per ordinara trajno. Sed en la printempo de 2007 Stoiber devis anonci sian demision por la aŭtuno. Lia partio CSU (Kristan-Sociala Unio), reganta de pli ol 40 jaroj en Bavario (kutime kun absoluta plimulto), pli kaj pli grumblis pri liaj eskapadoj kaj absolutisma regostilo, ĝis fine li devis konscii, ke oni volas elficigi lin.

Obstina politikisto

Tamen Stoiber restas obstina pri la transrapido, kaj jen, en septembro 2007, du tagojn antaŭ la definitiva demisio, li fiere komunikis, ke li forĝis kontrakton pri konstruado de la trako por 1,85 miliardoj da eŭroj. Triumfe li diris: „La politikaj respondeculoj ne haltigos tiun projekton.” Sed ĉiuj fakuloj kaj tre multaj politikistoj avertas, ke la financado tute ne estas certa; la indikita sumo baziĝas sur kalkuloj en 2004, kaj en la nuna kontrakto krome estas 50 milionoj de Eŭropa Unio, kiu tute ne havas buĝeton por tia projekto ...

Do laŭ kritikantoj temas pri nura prestiĝobjekto de Stoiber, kun malserioza financ-kalkulo kaj kontraŭ ĉiuj rezistoj. Ekzemple la urbestro de Munkeno, kiu parte posedas la flughavenon (kaj do rajtus kundecidi, ĉar ankaŭ la flughaveno devas kontribui al la investado), strikte kontraŭas la projekton; ĝi preferas konstrui rapidan urbotrajnon, kiu kostus multe malpli kaj kondukus pasaĝerojn ne multe malpli rapide al la flughaveno. Efektive, neniun argumenton taŭgas por konvinki pri la projekto. La plej multaj flugpasaĝeroj

ne venas el Munkeno, sed el aliaj regionoj de la vasta lando; ili devas uzi aŭtomobilojn, ĉar trajna itinero el neniun parto de Bavario kondukas al la flughaveno krom el Munkeno, de kie venas nur malmultaj pasaĝeroj.

Absolute superflua

Antaŭe Munkeno havis flughavenon periferie de la urbo, do estis facile atingi ĝin per trajno kaj pendolbuso de la ĉefstacidomo. Sed poste oni konstruis la novan flughavenon en regiono sen iu ajn fervojo. Do por giganta plimulto da bavaroj transrapido estas absolute superflua (kvankam per sia impostmono ili devas financi ĝin). Transrapido en Munkeno estas kontraŭdiro en si mem, ĉar nur dum malmultaj minutoj ekster la urbego ĝi povas ekspluati sian rapidon. Por la sama sumo oni povus konstrui fervojojn el aliaj grandaj bavaraĵoj urboj al la flughaveno.

Ĝenerale oni devas konscii, ke transrapido en dense loĝata lando, kia estas Germanio, ne havas sencon; ĝi bezonas vastan ne multe loĝatan regionon por ekspluati siajn kvalitojn. Germanio plejparte disponas pri densa reto de fervojoj, kiuj per ekspres-trajnoj (ICE = interurba ekspreso) ligas ĉiujn grandajn urbojn kaj preskaŭ ĉiujn flughavenojn (krom tiun de Munkeno). Tial ja oni nuligis la antaŭajn transrapidplanojn. Do la rezistoj abundas kaj ĉiuj grumblas pri tiu lasta decido de Stoiber laŭ absolutisma regado. Nun tamen dum duona jaro oni konkretigos la planon, kaj ni povas esti certaj, ke preciza kalkulado montros, ke ĝi ne estas realigebla per sumo, kiu ne ofendas prudenton. Post duona jaro do ni povas atendi definitivan entombigon de transrapido en Germanio. Neniu krom stulta Stoiber ploros pro tio. ■

BELGIO

Separismo ne, egalrajteco jes

La kabla ŝiplifto en Strèpy (Valonio) estas giganta konstruaĵo. Unu trogo estas pli granda ol futbalejo. La subvencioj por konstrui ĝin venis ĉefe el Flandrio ...

Fine de septembro *Hasbro*, la produktanto de la konata financa ludo *Monopoly*, decidis provizore ne plu eldoni belgan eldonon, sed unue esplori, ĉu ne pli taŭgus flandra, valona kaj brusela versioj. Alia financa giganto, iom pli serioza, la revuo *The Economist*, pli-malpli samtempe titolis artikolon *Belgium: Time to call it a day* (Belgio: la adiaŭa horo). *The Financial Times* estas pli hezita. Ĝi anoncis: „La kulturaj diferencoj en Belgio povus kaŭzi ĝian finon.” Sed kion pensas la loĝantoj de Belgio mem? Ĉu ili volas


du (aŭ pli da) ŝtatoj aŭ preferas resti kunaj? *MONATO* intervjuis kvindek da abonantoj.

Same kiel *The Economist*, pluraj citas ekonomiajn kialojn por la tendencoj disigi la ŝtaton Belgio. Pieter Jan Doumen el Hechtel (Flandrio) skribas: „Ekzistas giganta monfluo de Flandrio al Valonio. Laŭ ABAFIM (Administracio de buĝetado, librotendado kaj financa gvidado), tiu fluo en 2003 sumiĝis je 6,6 miliardoj da eŭroj kaj ĉiujare kreskas¹. Do ĉiu flandro transdonis en tiu jaro 1100 eŭrojn al la francingva-

noj. Tio jam ne estas solidareco, sed rabado.”

Flandroj helpu nin

Pri tiu situacio konscias kelkaj valonoj, sed ili reciproke petas financon helpon, ĉar en antaŭaj jarcentoj ili subtenis la flandrojn. Dominique Vallet el Jemappes (Valonio) skribas: „Certe, la flandroj estas pli multaj ol ni (pli ol 60 % de la popolo); certe, ili estas pli riĉaj; certe, ili estas kuraĝemaj kaj plenfortaj. Sed ili forgesas, ke ekde 1830 (la jaro de la kreo de Belgio) ĝis pli-malpli



La diversaj regionoj de Belgio: norde la nederlandlingva Flandrio, sude la franclingva Valonio, ekstremoriente la germanlingvaj Orientkantonoj kaj insule en Flandrio la dulingva ĉefurbo.

industriojn, sed, pli grave, ili havas la monopolon de ĉiuj nederlandlingvaj ĵurnaloj kaj magazenoj kaj de unu televidstacio. La strebo estas bona por kelkaj riĉaj familioj, sed ne por Limburgo² kaj certe ne por Bruselo.” Maurice Wouters el Onhay (Valonio) aldonas: „La divido [de Belgio] estas kun ĝojo antaŭvidata nek de flandraj, nek de valonaj ekonomikistoj. Ĉu tiu divido ne estos nova historia eraro?”

Kiel la problemoj ekestis

Marc Vanden Bempt el Herent (Flandrio) bele resumis por ni: „En 1830 Belgio kreiĝis kiel bufro inter la eternaj rivaloj Francio kaj Germanio. Tiun rolon ĝi plenumis brile dum jardekoj, intertempe ĝin transprenis kaj ĝeneraligis Eŭropa Unio. La valona parto entenas la iaman principiskopujojn Lieĝo, la graflandojn Namuro kaj Henegovio kaj parton de la duklando Luksemburgio. La flandra parto entenas la graflandon Flandrio kaj grandajn partojn de la duklandoj Brabanto kaj Limburgo³. La rilato kun la historia terdivido do estas sufiĉe arbitra, kaj ne nur Belgio, sed same Flandrio kaj Valonio ŝajnas artefaritaj.”

Kaj la germanoj?

Estas iom frape, ke pluraj argumentas pri la sendependiĝo de Flandrio kaj de Valonio, sed ke malmultaj diras ion ajn pri la estonteco de la germanlingva parto de la ŝtato aŭ pri Bruselo, ►

... sed antaŭ cent jaroj la monfluo okazis en la alia direkto. La haveno de Antverpeno iĝis granda ĉefe pro transportadoj al kaj de la valona industriregiono.

1960 tiu lando pliampleksiĝis precipe pro la valonoj, kiuj tiam estis la plej riĉaj. Nu, estas la vero: la valonaj politikistoj misregis, ili disperdis la riĉaĵojn de ĉiuj, ili ne faris la bonajn decidojn pri la ekonomia bonstato de Belgio, kaj nun Valonio estas ekonomia dezerto; pezo, kiu handikapas Flandrion. Sed ni permesis dum tiom da jaroj, ke Flandrio kresku! Nun ni bezonas helpon. Ĉu ili lasos nin morti?” Tamen, ĉu la mezuma flandro aŭ valono konscias pri la granda ekonomia diferenco inter la du ŝtatpartoj? Bernard Cassiers el

Bruselo opinias: „Mi plurfoje demandis franc- kaj nederland-parolantojn, ĉu ili scias, pri kio temas, sed la respondoj estis aŭ pasiaj aŭ indiferentaj, neniam objektivaj.”

Nur riĉaj familioj gajnas

Ne ĉiu kredas, ke ĉiu unuopa flandro ŝparus 1100 eŭrojn jare, se Flandrio kaj Valonio sendependiĝus. Laŭ Edward Kusters el Brasschaat (Flandrio) ŝparus nur kelkaj: „Kiu havus avantaĝon de tia agado? Certe kelkaj grandaj familioj. Ili ne nur posedas



MICHEL CLAIR

En brusela busstacio: „Je te promets un miracle”, mi promesas al vi miraklon. Ofte Belgio bezonas miraklojn, por ke flandroj kaj valonoj havu saman starpunkton.

► la grandparte franclingva enklavo ene de Flandrio. Laŭ *The Financial Times*, disfalo de Belgio en du partojn estas neebbla. Laŭ ĝi, la germanlingva komunumo certe volos reiri al Germanio, la luksemburganoj volos denove aparteni al la Granddukujo Luksemburgo kaj Bruselo iĝos sendependa teritorio, simile al Vaŝingtono. Raymond Gérard el Broechem (Flandrio) ne tute samopiniis. Laŭ li „la germana parto, kiu relative bonfartas, havos la eblecon alligi sin al Francio, Germanio aŭ Luksemburgo. Mi dubas, ĉu ili elektus Flandrion, eĉ se la lingvo nederlanda apartenas al la ĝermanaj.”

Kaj la reĝo?

Kaj kio pri la reĝo, se Belgio ne plu ekzistas? Raymond Gérard skribas: „Kio pri la monarkio? Tiu tute ne kaŭzas zorgojn. Ili kapablas savi sin mem, kaj fartos eĉ pli bone post la splitiĝo. Ĝenerale la valonoj subtenas la monarkion kaj la devizon de la lando: ‘Unueco fortigas’.”

Ĉu vere unueco fortigas, aŭ ĉu ni iru al la Eŭropo de la regionoj, ankaŭ en Belgio? Raymond Gérard plu komentas: „Laŭ mi, splitiĝo de la belga ŝtato eblas nur, se Eŭropa Unio plifortiĝas, kaj ni vere havos Eŭropon de la regionoj, ne nur de ŝtatoj.” Sed, li aldonas, „difini regionojn kaj ties kompetentojn estas malfacila tasko”.

Daniël Goes el Oostende (Flandrio) opinias: „La sola argumento, kiu pledas favore al daŭrigo de Belgio, estas la

ekzisto de la monarkio. Tamen ĉu pro tio la korŝiraj jura kaj fakta malegalecoj inter flandroj kaj valonoj eterne devas esti dorlotata? Kiel fervora strebanto por homaj rajtoj kaj por la egalvaloro de ĉiuj homoj, inkluzive la decidrajton de popoloj pri si mem, mi povas esperi nur, ke la konstruaĵo ‘Reĝlando Belgio’ tre baldaŭ apartenos al la pasinteco.”

La solvo?

Problemoj do ne mankas, sed ĉu ekzistas solvoj? Pieter Jan Doumen opinias: „La plimulto de la flandroj ne deziras disiĝi de Valonio. Por tio ili bezonus ja du-trionan plimulton en la federacia parlamento, kio tre verŝajne neniam eblos. Sendependigo eblus nur, se ili farus revolucion, kion ĉiuj flandroj abomenas.” Marc Vanden Bempt kredas, ke „neniu belgo volas denove la nefederacian ŝtaton de antaŭ tridek jaroj. Kion ja li volas? Miradoj da argumentoj favoras jen Belgion, jen du ŝtatetojn, amase ankaŭ internaj solvoj aperas. Ne ekzistas du belgoj kun sama bildo pri la fina celo. Ĉu do konservi la reĝlandon kaj iom ŝraŭbi pri la strukturo? Politikistoj plu diskutu kaj decidu, rapide por ne lasi Belgion sen registaro. Tio malbonas por ĉiuj belgoj, ĉu valonoj, ĉu bruselanoj, ĉu flandroj.”

Evidentiĝas, ke preskaŭ neniu respondinto al la MONATO-enketo volas la sendependiĝon de la diversaj etnoj en Belgio. Plimulto tamen deziras pli justan ŝtatreformon. Remy

Sproelants (Paal, Flandrio) vortumas jene: „Belgio ne plu federaciigu, sed konfederaciigu. Restu malgranda konfederacia ĉefestraro, konsistanta el nur protokola reĝo, sen ajna politika povo (la sveda modelo), el ĉefministro kaj ministroj pri eksterlandaj kaj internaj aferoj. Eble aldonigu ministro pri defendo, kvankam oni povus dividi la armeon kaj kunfandi la elementojn en eŭropa armeo. Ĉiuj aliaj aferoj estu la respondeco de la tri konfederaciaj ŝtatoj Flandrio, Valonio kaj la Orientkantonoj⁴. Kaj Bruselo? Tie mi vidas nur unu solvon: ĝi estu la ĉefurbo de Eŭropo, de Belgio kaj de Flandrio sub eŭropa administrado.”

Grégoire Maertens el Bruĝo (Flandrio) ne samopiniis pri Bruselo: „Dum jarcentoj kaj jarcentoj Flandrio cedis teritoriojn kaj personojn sekve de kompromisoj, militaj malvenkoj, traktatoj, interkonsentoj aŭ reĝa manipulado. Sufiĉas nun la cedado, la perfido. Suvereneco de Flandrio sen Bruselo estus denove malvenko, perfido. En federacia Belgio Flandrio povas atingi, kion ĝi volas, malfacile, jes, sed demokrate.”

Ni konkludas per la vortoj de Pieter Jan Doumen: „Separismo tute ne estas la kaŭzo de la konflikto, sed jes egalaj rajtoj por ĉiuj belgoj.”

Paŭl PEERAERTS

1. La belga banko KBC jam unu jaron antaŭe faris similan studon, kaj taksis la monfluan de Flandrio al Valonio je 5 miliardoj da eŭroj jare. VBO, la asocio de belgaj entreprenoj, kalkulis 3,38 miliardojn, kaj laŭ la universitato de Namuro temas pri 5,3 miliardoj.

2. La orienta parto de Flandrio.

3. La iama graflando Flandrio troviĝas ankaŭ parte en Francio kaj parte en Nederlando, la iamaj duklandoj Brabanto kaj Limburgo troviĝas pli-malpli duone en Nederlando.

4. La germanlingva parto de Belgio.

„Migranta filo” post 10 jaroj

Ĉi-jare okazas la 10-jariĝo de la reveno de Honkongo al ĝia patrolando Ĉinio. Antaŭ la reveno multaj dubis pri la politiko de „unu lando kun du sistemoj”. Okcidentaj komunikiloj profetis, ke Honkongo „mortos”, perdante siajn proprajn socian sistemon kaj vivmanieron.

Tamen post 10 jaroj evidentas, ke la ekonomio pli prosperas, la socio pli harmonias, kaj la leĝfarado pli kompletas. Ekzemple, en la 1970aj jaroj, Honkongo elstaris kiel la unua internacia financa centro en Azio. Hodiaŭ Honkongo, Londono kaj Novjorko konsistigas la tri grandajn financajn centrojn de la mondo. Laŭ indicoj publikigitaj en marto en Londono, Honkongo enviciĝas kiel la tria plej forta, tamen antaŭvideblas plia kresko.

Eksportado

Honkongo fariĝis ankaŭ internacia komerca centro. La sumo de la vara kaj serva komercoj proksimiĝas al kvaroblo de la tuta loka produktokvanto. Eksportado de konteneraj varoj kreskas je ducifera elcento en sinsekvaj kvar jaroj, tiel ke Honkongo estas naviga centro en la azi-pacifika regiono. Cetere, krom ŝtatdefendo kaj eksteraj aferoj regataj de la ĉina centra registaro, Honkongo ĝuas altan memstarecon en administracio, leĝfarado kaj en juĝaferoj.

Antaŭ la reveno al Ĉinio, Honkongo estis „migranta filo”. Post la reveno Honkongo konscias pri la subteno de la ĉina ĉeftero. Tio probable estas la plej granda ŝanĝo, kiu efikis al la disvolviĝo de Honkongo.

Laŭ enketo farita de la honkonga registaro aprile 2006, 75 % de honkonganoj fieras esti ĉinoj; 62 % fieras esti civitanoj de Ĉinio; 65 % opinias, ke pro la ĉina statuso en la internacia komunumo, ĉinoj ne plu suferas humiliĝon; kaj 76 % konsentas, ke honkonganoj bezonas patriotisman edukon.

Alice Liu



Prosperis Honkongo dum la 10 jaroj post ĝia reveno al Ĉinio.

La iama brita kolonio fariĝis grava komerca kaj financa centro.





Bamir Topi

ALBANIO

Krizo solvita

almenaŭ tri kvinonoj de la deputitoj (el 140 deputitoj devus voĉdoni por la prezidanto almenaŭ 84).

Tamen la reganta koalicio povis atingi maksimume 82 voĉojn. Nece-
sis pliaj voĉoj de la opozicio (socia-
listoj kaj aliaj aliancanoj), kiu dum la
lastaj du jaroj ne favoris la registaron.
Laŭkonstitucie oni devus aranĝi entute
kvin parlamentajn elektojn, post kiuj,
en okazo de malebleco elekti prezidan-
ton, la parlamento devus disiĝi, por ke
okazu novaj ĝeneralaj balotoj. Tio mul-
tekostus al la lando ankoraŭ malriĉa,
aspiranta esti invitita venontjare en
Nord-Atlantikan Traktat-Organizaĵon
kaj en Eŭropan Union.

Pro tio la politikaj partioj faris sian
plejebilon por trovi solvon kaj interkon-
senti pri prezidanto. Precedento jam
estas: antaŭ kvin jaroj socialistoj ak-
ceptis la proponon de demokratoj
(opozicio) pri Alfred Moisiu, la nuna
prezidanto.

Korupto

Ĉi-foje tamen demokratoj postulis,
ke nova prezidanto el opozicia partio
promesu eksigi la ĝeneralan proku-
roron Theodhori Sollaku, kiu, laŭ de-
mokratoj, implikis la batalon kontraŭ
korupto. Tion rifuzis socialistoj. Okazis
do elektoj kaj – mirakle – en la kvara
ariĝis 85 deputitoj subtene al la de-
mokrata kandidato.

Tiel sukcesis Bamir Topi, 50-jara
biologo, jam trifoja deputito kaj eks-
vicprezidanto de la demokrata partio.
Lia elekto ebligas al la lando trankvile
daŭrigi la vojon de reformoj kaj kons-
truado kaj esperi pri pli forta subte-
no internacia. Cetere ankaŭ Kosovo
sin sentas pli sekura survoje al sia
sendependiĝo. Ne hazarde la unua
bondeziro al Topi post lia elekto ven-
nis telefone de Fatmir Sejdiu, prezi-
danto de Kosovo.

Bardhyl SELIMI

F infine la albana parlamento
elektis novan prezidanton. Tio
okazis post krizo, kiun kaŭzis
la konstitucio. Kial? La konstitucio de
1998 difinis novajn regulojn por elekti
prezidanton. Tiu estu subtenata de

OPINIO

Songante pri gulaŝo



Pasis 17 jaroj post demokrati-
go de Hungario: ĝuste duono
de la socialisma erao, alinome
gulaŝkomunismo. Nuntempe oni re-
memoras kaj komparas ambaŭ eraojn.
La rezulto estas surpriza, ĉar ofte oni
songas pri la gulaŝo. Aro da libroj
traktas la temon, ankaŭ la ĉefkuiriston
de la gulaŝo, János Kádár, kies ostojn
nekonatoj elfosis kaj ŝtelis.

Regas nuntempe necerteco, ekzem-

ple rilate laborlokojn. Kiu havas poste-
non aŭ entreprenon, tiu ekspluatas. La
Eŭropa Unio ankoraŭ ne liveris rezul-
tojn: nur banditoj profitas, ĉar limoj es-
tas forigitaj. Negocistoj „laboradas” en
impostoparadizoj, kiuj troviĝas ankaŭ en
EU (ekzemple en Guernsey, insuloj mar-
kolaj). Aliflanke okulfrapas malriĉeco.
Senlaboreco stagnas aŭ kreskas (7,3 %);
inflacio atingis 8,6 %; pri sanservoj kaj
salajroj regas senespero.

Multas financaj skandaloj. La plej
gravaj politikistoj neimageble riĉas.
Ili superas la leĝaron, ekzemple kiam
temas pri trafikodeliktoj. Emeritoj, kies
subtenon bezonas politikistoj, kredas,
ke ilia sorto pliboniĝos. Sed la ceteraj
kuiras sian gulaŝon kaj en televido
spektas nostalgiajn filmojn pri socia-
lismo.

Karlo JUHÁSZ
Hungario

Ŝokega rezulto

Malvenkis la regantaj partioj en Japanio en la elektoj fine de julio. Suferis kaj la Liberala Demokratia Partio (LDP) kaj Koomei-Partio, kiam okazis elektoj por duono de la membroj de la Ĉambro de Konsilistoj. La ĝisnunaj 64 seĝoj de LDP reduktiĝis al 37, kaj male la 37 seĝoj de la plej granda opozicia Demokratata Partio multiĝis al 60. Sekve la du regantaj partioj okupas nur 105 el 242 seĝoj en la Ĉambro de Konsilistoj.

Tio signifas, ke, eĉ se la regantaj partioj aprobigus siajn leĝproponojn en la Ĉambro de Deputitoj, tio povos esti vana. Opoziciaj partioj povos bloki la proponojn en la Ĉambro de Konsilistoj. De post 1955, kiam LDP fondiĝis, ĝi ĉiam okupis la unuan lokon en la ĉambro. Do la rezultoj de la elektoj fariĝis ŝokega afero por LDP.

Kiam Abe Ŝintaroo ĉefministriĝis en septembro 2006, li estis tre populara. Parlamentanoj de LDP opiniis, ke, ĉar li estas belaspekta kaj devenas de bona politikista familio, LDP des pli prosperos. Tamen tio estis iluzio. Kolektiĝis ĉirkaŭ la ĉefministro amikaj politikistoj, malpli kapablaj, mone malpli puraj, kaj eĉ ŝovinismaj.

Naskiloj

Elŝprucis diversaj problemoj. En printempo la ministro pri bonfarto kaj laboro diris, ke virinoj estas naskiloj. Pro tiu ĉi stulta kaj diskriminacia fidiro virinoj koleregis kaj protestis. Opoziciaj partioj postulis la demision de la ministro, sed la ĉefministro rifuzis.

Poste malkaŝiĝis, ke la ministro pri agrikulturo „elspezis” multe da mono por sia parlamentana apartamento. Ĉambrojn parlamentanoj povas lui preskaŭ senpage, do opozicianoj demandis, kiel kaj kial la ministro elspezis tiom por preskaŭ senpaga loĝejo. La ministro respondis, ke li volis aĉeti

„ian multekostan akvon”. Samtempe li rifuzis prezenti kvitancojn. Defendis lin la ĉefministro – tamen en majo la ministro sin mortigis.

Ankaŭ lia posteulo kiel ministro pri agrikulturo simile enplektiĝis en kvitanco-skandalo rilate uzon de gepatra domo kiel oficejo. Fine la ministron pri defendo vane provis protekti ĉefministro Abe. La ministro publike duonaprobis usonajn faligojn de atom-bomboj sur Japanion. Forte kritikis lin la popolo, kaj la ministro demisiis.

Preteksto

Plue oni trovis, ke perdiĝis 50 milionoj da dokumentoj el la nacia pensiosistemo. Ĉiuj japanoj pagas kotizon, por ke emeritiĝinte ili ricevu ŝtatan pension. Multaj homoj tamen ne ricevas pension pro la preteksto, ke malkzistas dokumentoj por atesti la kotizojn. La ĉefministro promesis, ke en

unu jaro li solvos la problemon. Multaj lin ne kredas.

Ekde la ĉefministriĝo de Abe, LDP fariĝis aroganta, trude aprobigante leĝojn sen sufiĉe da diskutoj. Ekzemple Abe intencas revizii la konstitucion, por ke Japanio povu militi kun Usono. Pacamantoj maltrankviliĝis kaj protestis. Kvankam multaj homoj unue subtenis la ĉefministron, ili nun konstatas, ke Abe ne aparte celas plibonigi la vivojn de popolanoj. Malkleraj ministroj kaj perditaj dokumentoj liveras fatalan baton al la ĉefministro kaj al LDP.

Oni antaŭvidis, ke Abe eksiĝos, preninte sur sin respondecon pri la malvenko. Tamen li insistis resti ĉefministro. Fine, komence de aŭgusto, tri tagojn post la elekto, la nova ministro pri agrikulturo demisiis. Opini-enketito indikas, ke nur 2 % de la enketitoj kredas, ke Abe estas gvidkapabla. Intertempe Abe tamen demisiis.

HORI Jasuo

Abe Ŝintaroo





Maria Dungou vivas mizere kun sia bebo Antel Rostas apud aŭtovojo en Dublino.

IRLANDO

De rubaĵdeponejo al trafikcirklo

Unu el la plej danĝeraj trafikcirkloj en Irlando troviĝas sur la ŝtata aŭtovojo M50 en norda Dublino. Antaŭ nelonge, pro manko de pli taŭga loĝejo, familia grupo de 50 romaoj (ciganoj) el Rumanio establis primitivan tendumejon sur la trafikcirklo.

La grupo inkluzivas plenkreskulojn de ambaŭ seksoj kaj infanojn, el kiuj la

plej juna aĝas nur kelkajn semajnojn. Laŭ la direktorino de la Nacia Virina Konsilantaro de Irlando, la okupantoj de tiu tendumejo vivas en nehomaj kondiĉoj, sen necesejo, akvo, varmigilo, ŝirmo kaj inter ratoj kaj insektoj.

Pluraj aliaj homamaj organizaĵoj publike esprimis maltrankvilon pri la situacio de la grupo. Tamen reagis la

registaro per decido, ke la ciganoj, kiuj ne havas permeson por labori aŭ loĝi en Irlando, estu senpage retransportitaj per aviadilo al sia devenlando.

Azilo

La irlanda organizaĵo *Pavee Point* [pavi poĵnt], kiu reprezentas la interesojn de nomadoj, asertas, ke la statuso de romaoj el la novaj ŝtatoj de la Eŭropa Unio estas nun eĉ malpli bona ol antaŭ la aliĝo de tiuj landoj. Tiam ili rajtis (kvankam ne ĉiam sukcese) peti azilon kiel rifuĝintoj. Nun ne plu. Do, ekde nun, ili ne estos akceptitaj en Irlando, kie jam loĝas proksimume 40 000 rumanoj, el kiuj la plimulto ne estas romaoj.

La grupo ĉe la trafikcirkla tendumejo diras, ke eĉ pli mizeraj estis iliaj vivkondiĉoj en Rumanio. Tie ili devis loĝi sur urba rubaĵdeponejo. Unu el la grupanoj, Anton Rostas, patro de tre juna infano, diris al ĵurnalisto, ke li ne volas reiri al Rumanio. „Estas agrable ĉi tie”, li diris.

Kvankam evidentas, ke ne mankas simpatio por la romaoj, aliaj irlandanoj malakceptas ilin, dirante, ke la komunumo – kiu rajtas nek labori, nek ricevi socialan subtenon de la ŝtato – konsistas el almozpetanoj kaj ŝtelistoj. Samtempe ŝajnas, ke la ciganoj trovas simpation nek inter la neromaaĵ rumanoj jam loĝantaj en Irlando, nek ĉe la rumana ambasado.

Apartamento

Rumana diplomato opiniis, ke laŭ informo el la distrikto, kie antaŭe vivis la ciganoj, ili ja havis loĝejojn, kaj unu el ili posedis propran apartamenton. Eble oni rajtas demandi: se tio veras, kial la grupo preferas vivi en plej granda mizero en Irlando?

Subtenantoj kiel *Pavee Point* pleddas, ke EU-ŝtatoj urĝe konsiliĝu por solvi la problemojn de tiu ĉi efektive senhejma popolo, kiu, laŭ historiistoj, elmigris antaŭ pli ol mil jaroj el la hinda subkontinento. Oni memorigas pri la fakto, ke ciganoj dum jarcentoj estas viktimoj de persekutado en multaj landoj. La plej grava ekzemplo estas la murdo de miloj da ili en naziaj koncentrejoj dum la hitlera regado.

Garvan MAKAJ

La familio Rostas konsistas entute el 32 plenkreskuloj kaj 22 infanoj. Malgraŭ nehomaj kondiĉoj, ŝajnas, ke ili kontentas ... kaj ne volas reveni hejmen al Rumanio.



Pace vivi, pace morti

Lluís Maria Xirinacs [ŝirináks] i Damians estis pacisma politikisto kaj eks-sacerdoto, kiu fariĝis simbolo de la lukto por amnestio en la postfrankisma epoko. Estante kandidato por Nobelpremio pri paco en 1975, 1976 kaj 1977, Xirinacs elstaris pro siaj malsatstrikaj kaj neperfortaj protestoj. Ekzemple li sidadis 12 horojn tage dum preskaŭ du jaroj antaŭ la ĉefprizono en Barcelono, postulante amnestion por la politikaj malliberuloj.

En aŭgusto ĉi-jare oni trovis en arbaro en Katalunio lian kadavron. Kelkaj ĵurnaloj menciis memmortigon. Tamen, laŭ postlasita skribaĵo, ŝajnas, ke li malsanis kaj translokiĝis en la montaron por sole, pace kaj silente forpasi.

Rezisto neforta

Xirinacs naskiĝis en Barcelono en 1932. Fariĝinte sacerdoto, kiam li aĝis 22 jarojn, li rifuzis akcepti monon donitan de la ŝtato al la eklezio. Li komencis malsatstrikon por protesti kontraŭ la ligoj inter eklezio kaj ŝtato. Poste li estis kuniniciatinto de la Asembleo de Katalunio, al kies suvereneco li dediĉis sian vivon. Estante neperfortulo, li sekvis la idearon de Gandhi, inkluzive de rezisto neperforta, kaj estis plurfoje malliberigita.

En 1977 li kandidatis unuopule en Barcelono por la senato kaj estis amase voĉdonita. En la senato, dum ĉiuj sidis, li staris proteste al la malpermeso uzi la katalunan. Li ĉiam luktis por la sendependeco de la Kataluna Landaro kaj en 2001 deklaris tiucele malsatstrikon en la placo Sant Jaume de Barcelono.

Konflikto

Xirinacs estis kondamnita en 2004 pro „pravigo de terorismo”, ĉar en 2002 li deklaris sin amiko de la vaska naciis-



JORDI SALVA



DAVID DATZIRA

La funeralon 17 sacerdotoj cerminoniis, ĉ. 3000 homoj plenigis la bazilikon, 20 minutoj da aplaŭdoj ene de la preĝejo finis la cerimonion kaj ekis la eksteran 4-horan subpluvan omaĝon.

ma grupo ETA, konsiderata i.a. de la Eŭropa Unio kiel terorisma organizaĵo. Xirinacs citis Gandhi kaj diris, ke, kiam ekzistas konflikto, neperfortulo ne povas deklari sin neŭtrala, ĉar en konflikto neŭtraleco helpas la plej fortan.

Adiaŭe kaj testamente Xirinacs postlasis diversajn mesaĝojn. Li skribis: „Mi volas fini miajn tagojn en la soleco kaj en la silento” kaj resumis sian vivon tiel: „Mi vivis sklave sepdek kvin

jarojn en Kataluna Landaro okupita de Hispanio, de Francio (kaj de Italio). Mi vivis lukte kontraŭ tiu sklaveco ĉiujn jarojn de mia plenaĝa vivo. Sklava popolo, samkiel sklava homo, estas honto por la homaro kaj por la universo. Sed popolo neniam estos libera, se ĝiaj anoj ne volas riski ties vivon en ĝia liberigo kaj defendo.”

Ferriol MACIP I BONET

VIRINOJ

Ŝanĝiĝu nia propra sinteno

Allogas Litovio ne nur pro siaj historio, arkitekturo aŭ natura ĉarmo, sed fojfoje pro siaj belulinoj. Ekster Litovio, ekzemple, troveblas reklamoj laŭdantaj litovajn virinojn. Itala retejo informas, ke litovinoj „estas tre dolĉaj, tre inecaj kaj multe atentigas sian aspekton”.

Samtempe konsiliĝas italoj: „Veninte al Litovio kaj dezirante konatiĝi kun litovinoj, estu afablaj kaj diligantaj, ne

kriadu. La plej alloga eco por virinoj estas modesteco.”

Jam fariĝis kvazaŭ tradicio prezenti turismajn valorojn de Litovio surbaze de ĝiaj virinoj. Tial turisto notis interrete: „Italoj estas invitataj al Litovio pro malmultekosta biero kaj diinaj virinoj.”

Ĉiĉeroninoj

Mem kulpas litovoj, pri tio ke ilia lando famiĝas pro belaj kaj facile atin-

geblaj virinoj. En gazetaĵoj ofte estas proponataj la servoj de belaj ĉiĉeroninoj, kiuj akompanas gastojn al hoteloj aŭ apartamentoj. Kulpas eĉ la ŝtata turisma departemento, kiu en subvenciata eldonaĵo reklamis incitnudiĝajn klubojn.

La departementestro neis, ke Litovio fariĝas lando de seksa turismo. „Ne estas vero, ke turistoj venas al nia lando pro malmultekosta biero kaj belaj virinoj. Ni devas fieri, ke niaj inoj estas simpatiaj, tamen mi ne kredas, ke seksa turismo prosperas”, li diris.

Seksobjektoj

Respondeculo pri seksa egaleco en Litovio Margarita Jankauskaitė, opinias, ke kulpas la socio. „En Litovio ne estas akcentataj inaj saĝo kaj atingoj. La amaskomunikilaro formas impreson pri juna, seksema blondulino. Nur ino tia ion meritas”, ŝi bedaŭras. Pro tio ŝi kredas, ke eksterlandanoj emas konsideri litovinojn seksobjektoj.

Jankauskaitė opinias, ke inoj en orienta Eŭropo allogas okcidentanojn pro siaj humileco kaj simpleco. Cetere en Litovio ne agas feministaj movadoj. „Oni povas ŝanĝi opiniojn de turistoj, kiuj venas al Litovio nur por distriĝi”, ŝi diras. „Sed komence ŝanĝiĝu nia propra sinteno pri virinoj.”

LAST

NEPALO

[F]ina venko

ELBERT CHU

Iom post iom boniĝas la situacio de virinoj en Nepalo. Lastan jaron ŝanĝiĝis la leĝo, tiel ke ankaŭ filino rajtas sen diskriminacio fariĝi reĝino. Antaŭe nur filo rajtis heredi la tronon.

Cetere, ĉi-jare, civitano rajtas ricevi nacian identigilon, prezentante patrinan identeco-karton. En la pasinteco validis nur patra identeco-karto. Krome, dum en antaŭaj elektoj nur 5 % de la kandidatoj estis virinoj, la registaro nun permesas, ke 33 % de la kandidatoj estu virinoj.

Tiurilate helpis la venko de la nepalaj ribelintoj. Ili elektis pli da virinoj al la nacia parlamento, kie ĵus enoficiĝis tri ministrinoj. Ŝajnas, ke ĉiam pli da virinoj nun aktive partoprenas sen diskriminacio en la publika vivo de Nepalo.

Navin SHRESTHA/pg

PORTUGALIO

Kie la beboj?

Antaŭ 40 jaroj abundis en Portugalio infanoj kaj junuloj, kiuj buntigis per siaj ludoj urbojn kaj vilaĝojn. Nuntempe sentebblas, ke maljunuloj invadis parkojn kaj kafejojn. Bone, ke oni longe vivas, sed kie estas la beboj?

La internacia kaj sendependa Instituto pri Familia Politiko, kiu sidejas en Madrido, prezentis studdokumenton en Bruselo, kiu almenaŭ parte klarigas, kial infanoj malaperas. Unu el ĝiaj konkludoj estis, ke en 2006 Portugalio havis la plej malaltan naskokvanton de la lastaj 20 jaroj.

El inter la iamaj 15 membroj de la Eŭropa Unio, Portugalio estis unu el

kvar landoj, kun Hispanio, Italio kaj Grekio, kie gepatroj ricevis malplej da mono por prizorgi kaj eduki infanojn. Laŭ raporto *La evoluo de la familio en Eŭropo 2007*, bazita sur statistiko de 2004, portugalaj gepatroj ricevis jare 168 eŭrojn; en Luksemburgio 2291 eŭrojn. Ankaŭ Danio, Svedio kaj Irlando troviĝas inter la plej malavaraĵoj landoj rilate gepatrajn subvenciojn.

Pli lastaj statistikoj rilate la 25-membran union konfirmas la avantaĝojn ĝuatajn de la plej riĉaj landoj. Luksemburgio daŭre troviĝas supre; Pollando okupas la lastan lokon (48 eŭroj jare).

Divorcoj

Cetere, Hispanio, Portugalio kaj Italio estas laŭorde la eŭropuniaj landoj, kie divorcoj plej altiĝis en la lastaj 11 jaroj. En Hispanio kreskis divorcoj je 326 %; en Portugalio je 89 %; en Italio je 62 %. En Eŭropo ĉiu dua geedziĝo finiĝas per divorco. Inter 1990 kaj 2005, tiuj divorcoj trafis 21 milionojn da infanoj.

Rezulte ne nur malkreskas la nombro de naskiĝoj, sed ankaŭ kreskas ĉiam pli da infanoj ĉirkaŭataj de familiaj problemoj. Ofte ne eblas garantii familian stabilecon.

La raporto proponas kiel plibonigi familian vivon. Nepras krei socian akordon inter politikaj partioj, sociaj agantoj kaj familiaj institucioj. Nepras ankaŭ doni pli da mono al familioj, apogi gravedulinojn kaj redukti je 50 % la impostojn de porinfanaj varoj.

João José SANTOS

UKRAINIO

Ido-krizo

En Ukrainio kreskas la nombro de familioj, kiuj ne havas infanojn. Proksimiĝas demografia krizo. Se en la sovetia periodo en Ukrainio estis proksimume 52 milionoj da loĝantoj, nun estas nur 48 milionoj. Ĝis la fino de la 2020aj jaroj tiu nombro povas esti proksimume 27 milionoj.

Kulpas ĉefe ekonomiaj problemoj (ne indas naski infanojn sen ebloj bone ilin finance zorgi), nestabileco en la lando (konstantaj politikaj krizoj) kaj tro rapida viv-maniĝo (ne sufiĉas tempo „por si mem”).

Laŭ kalkuloj de specialistoj, seninfanaj familioj konsistigis en 1982

28,3 % de la popolo, en 1995 56,2 % kaj en 2005 62,8 %. Por subteni naskadon en Ukrainio oni planas ne nur altiigi financan helpon por patrinoj, sed ankaŭ doni seninteresan krediton, por ke familioj kun tria infano akiru loĝejon.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

ALBANIO

Pri ŝtupoj kaj supoj

Kvankam la albana ĉefurbo Tirano triobliĝis dum la lastaj 17 jaroj, malofte oni starigis novajn konstruaĵojn. Plejparte oni renovigis kaj pligrandigis ekzistantajn konstruaĵojn, ekzemple lernejojn. Mankas mono por nova konstruado.

Tamen ofte la malnovaj konstruaĵoj ne eltenas aldonajn etaĵojn aŭ internajn modernigojn. Okazas akcidentoj, kiel ekzemple antaŭ nelonge ĉe la tutlanda hotelumada kaj turisma mezlernejo. Dum instalado de novaj ŝtuparoj masonistoj tiom malfortigis la struktu-

ron, ke ĝi ne plu eltenis. Falis tri etaĵoj kaj mortis du laboristoj, aliaj grave vundiĝis. Feliĉe forestis lernejanaro.

Pro la akcidento la registaro rekonstruas sian konstru-politikon, aparte rilate lernejojn. Oni devas finfine kom-

preni, ke pli bone estus konstrui novan lernejon, ol rekonstrui malnovan. Malkara supo bruligas viajn lipojn, diras proverbo. Ankaŭ nura rekonstruado bruligas la urbodoman kason.

Bardhyl SELIMI



ENI TURKESHI

TOGOLANDO

Kurenta krizo

„Kulpas ne CEET, sed io alia, kion ni ne scias. Nur la registaro solvu la enigmon ĉirkaŭ la afero”, komentis ĵurnalisto, aŭdinte kanton, kies verkinto akuzis la togolandan elektran kompanion CEET, ke ĝi rifuzas liveri elektron al la popolo.

Elektro fariĝas raraĵo en Togolando. La tutan tagon oni havas ĝin nur kelkajn horojn. Tio bremsas multajn laborojn. Entreprenejoj fermiĝas, administraj afaroj malrapidiĝas, manĝoj putras, kaj en hospitaloj homoj mortas. Ĉiu povas imagi la rezultojn de la krizo.

Laborhoroj konstante ŝanĝiĝas. Oni laboras, kiam estas elektro. Tutan tagon oni nenion faras, sed kiam nokto-meze ekfunkcias elektro, komenciĝas la laboro. Oni povas tamen sin deman-

di, ĉu laboroj tiaj fruktodonas.

Nepago de Togolando al tiuj, kiuj liveras elektron, kontribuas al la krizo.

Cetere al tiu ĉi aldoneblas alia: mankas akvo en la turbinoj.

GBEGLO Koffi



PAUL WILLIAMS



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al moderna_vivo@monato.net.

SOCIAJ RETOJ


Ĉio en unu programo

La 12an de oktobro la socia retejo *Ipernity* malfermis al la publiko sian esperantlingvan fasadon. Jen kialo por iom fosi en la historio de la retejo kaj informpeti pri la planoj por la estonteco.


Ipernity nomas sin mem la „ĉio-en-unu” de la Reto 2.0¹. Ĉiu uzanto de la retejo povas prezenti sin mem al la mondo, aŭ al memdifinita grupo amika aŭ familia, pere de tekstoj, la tiel nomata blogo, pere de memfaritaj bildoj, filmoj aŭ sonregistraĵoj, aŭ per kombino de ĉio ĉi. Jam ekzistas retejoj, kie oni povas kolekti kaj montri siajn fotojn; estas aliaj, kiuj arigas filmetojn; en ankoraŭ aliaj oni povas havi sian propran blogon. *Ipernity* havas ĉion „sub unu tegmento”. Tiu ĉi koncepto estas tute nova.

La personoj, kiuj havas aliron al la retejo, povas laŭplaĉe komenti, aŭ fari ligojn al sia propra retejo, tiel ke rapide formiĝas amika etoso. Se oni traegas la ĝisnunajn blogaĵojn, oni vidas, ke pluraj miras, kiel rapide amikecoj ekestas. Ne nur oni vidas la fotojn aŭ filmojn de la uzantoj, sed samtempe ▶

La specifa bonaĵo de Ipernity laŭ mi estas, ke ĝi estas ne nur esperantlingva, sed ke Esperanto kaj esperantistoj ĉi tie aperas egalrajte kun aliaj lingvoj kaj lingvanaroj. Tio laŭ mi estas preferinda ol enfermiĝi en apartaj esperantujoj. (Kalle Kniivilä)



Ipernity nomas sin mem la „ĉio-en-unu” de la Reto 2.0¹. Ĉiu uzanto de la retejo povas prezenti sin mem al la mondo, aŭ al memdifinita grupo amika aŭ familia, pere de tekstoj, la tiel nomata blogo, pere de memfaritaj bildoj, filmoj aŭ sonregistraĵoj, aŭ per kombino de ĉio ĉi.



Ĉiu uzanto povas difini, kiujn aliajn uzantojn li konsideras amikoj, kaj poste per unu klako li povas vidi, kio estas nova ĉe tiuj amikoj: kiujn novajn fotojn ili publikigis, kiujn filmojn ili kreis, kiun muzikon ili ŝatas aŭdi (kaj kunhavigi al vi), kion ili komentis pri la verkoj de aliaj kaj multe pli.

Islanda historia romano

Sagao de Njal apartenas al la t.n. *Islandanaj Sagaoj*, verkitaj de nekonataj aŭtoroj en la 13-a jarcento. La sagaoj estas prozaj rakontoj pri eventoj okazantaj ekde la fino de la 9-a jarcento ĝis la komenco de la 11-a. Tiuj eventoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktis la temon artisme, tiel ke oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn.

Sagao de Njal estas la plej granda kaj artisma el la sagaoj. Malgraŭ vasta personaro kaj komplika eventaro ĝi formas arte kunplektitan tutajon; oni havas la impreson, ke ĝia aŭtoro havis enmense ĝian lastan vorton jam en la komenca ĉapitro. Konfliktoj, venĝoj, repaciĝoj viciĝas en drameca sinsekvo ĝis la definitiva solviĝo en la fino.

Personecoj atestas pri si mem per vortoj kaj faroj, neniam estas dirite, kion ili pensas.

La sagao estas tradukita jam en multajn lingvojn. Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj en 2002 *Sagao de Njal* estis elektita kiel unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda fikcia literaturo.



Paĝoj: 357; ilustrita; 21 cm; kudre bindita; 2003;

Prezo: € 18,00


Informoj:

tlf. +32 3 234 34 00;

tlk. +32 3 233 54 33;

rete: tutiko@fel.esperanto.be

<http://retbutiko.esperanto.be>

Furoro de 

► povas informiĝi pri ilia vivo, ilia lando, iliaj ŝatoj ... Senpaga interna retpoŝto kaj facile uzebla tujmesaĝilo inter la uzantoj ankoraŭ pli faciligas tiun interkontaktadon.

Franca iniciato

La fondon de *Ipernity* en aprilo 2007 iniciatis du francoj, kiuj jam pruvis sian kapablon antaŭe en la Reto 1.0: Christophe Ruelle, 35-jara, kiu estis ĉe la bazo de la franca retejo *Voila.fr*, kaj Christian Conti, 39-jara, kiu kunfondis la retejojn *Respublica.fr*, *Chez.com* kaj *Netradio.fr*. Estis ankaŭ Christian Conti, kiu, aŭdinte pri artikolo en *MONATO* pri la Reto 2.0, iniciatis la aldonon de esperantlingva fasado.

Kvankam la iniciato estis franca, la retejo neniel nun restis tia. La plimulto de uzantoj nun estas germanaj, sed estas grandaj grupoj da hispanoj, katalunoj, islandanoj, svisoj kaj kompreneble francoj, Esperanto-parolantoj kaj multaj aliaj. Usonanoj kaj britoj tamen estas malplimulto, kio grave influas la lingvo-uzon en *Ipernity*: la angla tie ne superregas.

Senpaga

La baza versio de *Ipernity* estas senpaga. En tiu baza versio oni povas alŝuti 200 megabajtojn da dokumentoj (fotoj, filmoj, sondosieroj) monate. Kiu volas alŝuti pli, povas kvinobligi sian kvanton kontraŭ 1,99 eŭroj monate. La programo estas ankoraŭ en *beta*-stadio. Tio signifas, ke ĝi estas jam perfekte uzebla, sed oni konstante aldonas kaj testas pliajn eblojn. Unu el tiuj eroj ĵus aldonitaj estas grupoj. Imagu, ke kelkaj uzantoj havas la samajn interesojn. Tiam ili povas fondi grupon, tiel ke ili pli facile povas trovi sin, interŝanĝi spertojn kaj multe pli. La ĉefa retejo de *Ipernity* troviĝas en www.ipernity.com/?lg=eo, sed ĉiuj uzantoj povas ricevi privatan adreson kiel *mia nomo.ipernity.com*.

Paŭl PEERAERTS

1. Reto 2.0 estas neformala nomo por la plej lastaj evoluoj en TTT, ĉefe tiuj, per kiuj la uzanto povas mem facile krei aŭ adapti retpaĝojn.

La vualo, romantika kaj erotika

Nepre, por ne maljuste prijuĝi la vualojn, oni devus konstati, ke la belulinoj de la „dika vualo” tute ne restas tro avaraj. Dum ili pasas aŭ se ie sur la vojo aŭ en socia okazo vi trafas ilin, ili ofte donacas al vi agrablan kortuŝan ekvidon pri vizaĝoj aŭ elegantaj staturoj laŭ oportuna figur-movo, rideto aŭ palpebrumo, kiuj radias al vi plezuron kaj levas por vi la moralon.

En la kamparo de arabaj kaj islamaj landoj, kie la vizaĝ-vualo ĉiuokaze apenaŭ ekzistas, knabino ekzemple de Mez-Oriento (Libano, Palestino, Sirio, Jordanio) eĉ flirtas per levo de sia granda, brodita ŝalo, simple nigra aŭ bunta, iomete super la kapo nur dum unu-du momentoj, por ke vi povu ekvidi la inecon en la plenaĵo de ŝia hararo kaj la nete buklita plektaĵo. Ŝi timeme palpebrumas je siaj okulharoj al vi kun rideto sur sia vizaĝo; kaj kvankam, kiam ŝi preterpasas, ŝi ne sin turnas al vi, tamen vi sentas tute certe, ke tia ora radieto ankoraŭ blovetas parfuman amon al vi, dum ŝi foriras en tiujn rok-dotitajn vojetojn de la montara vilaĝo aŭ laŭlonge de la verdaj deklivoj mal-supren en la valon de la rivero Litani. Intertempe, vi ankoraŭ ĝoje tenas tian imagon, kiu eĉ post jardekoj ne tute malaperas el via kora memoro.

La vualo mem, do, estas kaj kapvestaĵo kaj romantika, eĉ erotika, allogaĵo, kies aspekton ambaŭ seksoj plezure ĝuas kaj kiun la socio aprobas.

Deveno

Ĉiuokaze, ĉu ne endas iom prove esplori, kial unuavice estiĝis la vualo, de kie ĝi devenis kaj pro kiaj kaŭzoj. Virinoj en la pasinteco kutimiĝis, kaj ankoraŭ kutimas, en kelkaj partoj de Arabio kaj islamaj landoj, uzi vualon laŭ diversaj manieroj, modoj kaj grandecoj¹. Iu tipo de vualo plene kovras la figuron ekde la kap-pinto ĝis la pied-fingroj, alia nur la figuron sen vizaĝo kaj

manoj, tria nur la kapon kaj la hararon – ĉiam tamen kutime kun longa robo, almenaŭ ĝis sub la genuoj, kaj tiel plu, laŭ pluraj diversaj naciaj vestmanieroj.

Ĉar ĉi tiu aŭtoro dumlonge alterne loĝadis en urboj kaj en kamparoj de pluraj arabaj landoj kaj vojaĝadis tra arabaj kaj islamaj landoj, ofte kun vigla observado de arabo-islamano, kiu ankaŭ iom spertis „la alian flankon” de la mondo, tial prosperis al mi iel imagi, kiamaniere oni pratempe komencis uzi la vualon en Arabio kaj kiajn gravon kaj funkcion ĝi ankoraŭ havas por multaj loĝantoj.

Rilate al la vualo mem kiel vestaĵo kaj ĝia deveno oni eble povas supozi, ke ĝi originis kaj nature evoluis ĉefe pro la ĉirkaŭaj naturaj faktoroj kaj sociaj cirkonstancoj de la regiono – pli ĝuste ol aserti, ke ĝia uzateco estiĝis nur pro religiaj influoj, kiel iuj volus pensi nuntempe. Ni do provu konsideri kelkajn probablajn faktorojn.

Unue, oni povus ĝuste imagi la bezonon de vualo kiel masko kontraŭ sablo-ŝtormoj kaj brula varmo sub la dezerta suno, al kiu nepre la nomadaj beduenoj, la indiĝenoj, estas rekte malŝirmataj. Due, ĉar ekde antaŭ mi-

loj da jaroj kaj ĝis antaŭ nelonge nenio povis protekti la nomadon kaj liajn familianojn kaj bestaron kaj aliajn havaĵojn krom la glavo kaj la sekreteco de kamuflado, tre verŝajne do oni bezonis maskadon kontraŭ dezertaj rabistoj. Fine, la vualo en sia plena grandeco estas la *aba-robo*. Tio estas fluanta vesto, kutime teksita el ŝaflano, kapro- aŭ kamel-haroj, kies koloro kutime estas nigra (nokta koloro), griza (vintra koloro), aŭ hel-flava (koloro de sablo), aŭ striita laŭ tiuj koloroj. La *aba* kutime kovras la tutan figuron.

Uzateco

Aba-robo (abao) servas tre diversajn utilojn. Ĉi tiu aŭtoro persone en diversaj okazoj rimarkis ĝian uzatecon interalie por la jenaj aferoj ĉe beduenoj en la dezerto kaj ĉe kamparanoj kaj foje ĉe urbanoj en diversaj partoj de Arabio.

1. Kiel kamufla masko, por eskapo kaj simile, kiam oni devas pasi fremdajn lokojn dum la ofta vagado en la vastaj malplenaj ebenaĵoj de la araba duon-insulo.
2. Kiel fajr-estingilo, ankaŭ kiel bandaĝo por vundoj, kaj simile. ►

YANKO TSVETKOV



- 3. Kiel armilo kontraŭ sovaĝa besto aŭ atakanto.
4. Kiel rimen-ĵetilo.
5. Ĉar la abao estas ege fluanta sur la staturo, ĝi povas iom kaŝi la efektivan figuron kontraŭ malamika pafado.
6. Kiel signalilo: oni svingas ĝin super la kapo en soleca loko (dezerto ktp) por atentigi malproksiman personon aŭ por peti helpon. Oni ankaŭ svingas ĝin ĉe festetoj, dum dancado aŭ kiam oni eligas milit-kriojn.
7. Kiel ŝnuro (por ligi beston aŭ boaton).
8. Kiel superpalto.
9. Kiel dormsako aŭ kapkuseno.
10. Kiel balancilo aŭ lulilo por infanoj.
11. Kiel boat-velo.
12. Kiel reto por fiŝkaptado.
13. Kiel kap-pufo, aŭ ŝultro-pufo por porti pezaĵojn.
14. Kiel balailo.
15. Kiel korbo por porti aĵojn.
16. Se ies figuro ne estas tre eleganta, certe pro sia rekta formo, la abao povas „korekti” la forman neperfektaĵon.
17. Kiel kribrilo de akvo kontraŭ argilo kaj akvo-insektoj.
18. Kiel mur-breto aŭ lignokorbo.
19. Kiel pluv- aŭ sun-ombrelo.
20. Kiel mato, „tablo”-tuko aŭ pleto por manĝaĵoj aŭ aliaj aferoj.
21. Kiel tendo, ankaŭ kiel kurteno inter ĝiaj sektoroj.
22. Kiel ventumilo (ankaŭ klimatizilo, kiam oni malsekigas la abacon).
23. Kiel prestiĝa vesto en iuj arabaj landoj (ekzemple en Saŭda Arabio).
24. Fine, ĉar la fadenoj de la abao estas sufiĉe fortikaj (kiel jam menciite, kutime faritaj el lano, kamel- aŭ kapro-haroj), do post jaroj, kiam ĝi malnoviĝas aŭ difektiĝas, oni povas malplekti la fadenojn kaj doni ilin al teksisto por denove teksu novan abarobon.

Certe neniuj aliaj unuopa vestaĵoj povas servi ĉiujn tiajn kaj similajn utilojn.

Diversaj specoj de vualoj

La tradicia *kufija*-kaptuko: ĝi estas ankaŭ vualo, ankaŭ estas la virina ŝalo, en tuta Mez-Oriento. Ĝi estas eĉ biblia kap-vesto, certe la sama kiel tiu de Maria, la patrino de Jesuo. Historie

oni povas diri, do, ke tia vest-modo estas tipa ĝenerale por la semida kulturo de Mez-Oriento. Eble pro la dezerta klimato, nur araboj plimulte bezonas la vualon. Kvankam vualo eble aspektas „fremde” por alilandanoj, tamen multaj el ili diras, kaj plurfoje tion mi aŭdis, ke al ili plaĉas la araba vest-modo, kvankam, dume, ĝia praktikeco por aliaj kulturoj en malsamaj cirkonstancoj, kompreneble estas alia afero.

Do, kiel jam dirite, estas la sablo, la varmo kaj la neamika soleco de la dezerto, kiuj unuavice devigis homojn uzi la vualon. Kvankam seksa atako tre malofte okazas inter beduenoj, ĉar tio estus granda honto por la tribo de la atakanto, kiu kutime pro tio ricevas severan punon, tamen virino devas kaŝi sian vizaĝon ankaŭ por kamufli. Mi ankaŭ rimarkis, ke kelkfoje bedueninoj vestas sin same kiel viroj, kio persone al mi aspektas erotika vest-modo, kvankam eble ili celas kaŝi sian sekson dum trairado tra fremda regiono. En tempoj de konflikto kaj reciprokaj invadoj – aparte antaŭ la naskiĝo de Islamo – oni ne hezitis kapti infanojn kaj virinojn kiel ostaĝojn; tamen ofte okazadis poste, ke la malamikoj edziĝis al tiuj virinoj, kaj do iliaj infanoj pareniĝis al ambaŭ rivalaj triboj – kio tiel estis faktoro por re-interpaciĝo ĉe la nova generacio.

Islamismo ja donis disciplinon en Arabio, tamen la dezerto kun siaj kruelaj ĉirkaŭaĵoj eterne restas, kaj kune kun ĝi firme restas la leĝo: ĝi ne nur ne devigas ian ajn specifan vualon por la vizaĝo de la virino, tamen – male – ĝi devigas malkaŝon, ekzemple en aŭtoritataj lokoj, kiel en oficejoj kaj kortumoj, por montri la personan identecon. Ankaŭ virinoj kun nekovrataj vizaĝoj viciĝantaj malantaŭ viroj por preĝado en moskeoj estas komuna, kutima vidaĵo tra la tuta islama mondo.

Jen do la efiko de naturaj influoj kaj la pasintaj sociaj konsideroj, kiel ĵus menciite, ekzemple pri la fluantaj vestaĵoj de la blanka aŭ ruĝa abarobo. Kvankam la ŝario (la islama leĝaro) baze postulas decan vestiĝ-stilon, kaj por viroj kaj por virinoj („Konsilu al la kredantinoj turni la okulojn for de tento kaj konservi la ĉaston; kovri siajn or-

namojn (krom tiujn, kiuj normale estas senkaŝaj); tiri la vualojn sur la sinojn kaj ne malkaŝi siajn ornamaĵojn krom al edzoj kaj patroj” ktp – la Korano), longaj vestoj *farua* kaj *hamdaniya* (ambaŭ superpaltoj el ŝaflano kun tre longaj manikoj) kaj la *ŝirualo* (fluanta pantalono) kaj aliaj similaj estas ankoraŭ elstaraj en la araba vest-maniero.

Se ankaŭ temas pri la nove-riĉaj araboj, dezert-klimataj vestaĵoj videble ne plu estas „laŭmodaj” ĉe pluraj el ili, pro la benoj de la moderna tekniko, ekzemple de la klimatiziloj, kiuj senigas la samumon (varman venton de la dezerto) de ĝiaj kornoj kaj junigas ĝin kiel malvarmetan venteton sub la infera suno. Ĉar oni ne atendas, ke araboj ĝenerale fariĝos multe pli riĉaj dum la venonta tempo, oni do ankaŭ ne anticipas, ke multaj el ili baldaŭ demetos siajn tradiciajn vestojn – same kiel pluraj jam faris – por fariĝi tiel nudaj, kiel tiuj, kiuj alprenas la tiel nomatan korpo-kulturon kaj ĝian idealon de „bel-formo”.

Intertempe, oni aprezas, ke kelkaj el tiuj vestaĵoj fakte restas praktikaj por la indiĝenoj, ekzemple la abarobo, kiu almenaŭ en arabaj okuloj estas ne malpli ol gracia vestaĵo.

Cetere, iam en la fruaj sepdekaj jaroj aperis en la londona taggazeto *The Times* intervjuo kun eksterlandaj laboristoj pri la temo de la seksa revolucio kaj la tiam apero de virinaj mini-jupoj; ĉe tio jugoslavia laboristo komentis: „En nia lando oni ne montras tion, kion oni ne estas preta forvendi.” Jen fakte multe da vero pri la motivo de iuj el-montremaj tendencoj rilate al tiu sin-indulga, frivola „revolucio”.

Husejn AL-AMILY

1. **Noto de la redaktoro:** En norda Afriko ĉirkaŭ 200 jarojn post Kristo, do longe antaŭ la profeto Muhamado, junaj kristanaj virinoj subite grandamase forigis siajn vualojn, asertante, ke pro kristaniĝo ili ne plu bezonas uzi tiujn. La fama kristana teologo Tertuliano furioze reagis, asertante, ke estas tradicie ĉie, ke decaj virinoj uzas vualon – kaj judaj kaj sekve ankaŭ kristanaj. Tiu anekdoto sugestis, ke porti vualojn almenaŭ tie estas ege malnova kultura tradiciaĵo.

Urbiĝo kaj malriĉiĝo

En junio 2007 la Loĝantara Fonduso de la Unuiĝintaj Nacioj publikigis sian raporton pri la loĝantara stato de la mondo en 2007. Dum la 20a jarcento, la urba loĝantaro de la mondo jam rapidege kreskis de 0,2 ĝis 2,8 miliardoj kaj en la venontaj 20 jaroj ĝi ankoraŭ montros senprecedencan kreskon en la disvolviĝantaj landoj.

Turnopunkto en 2008

La kresko estos precipe rimarkebla en Afriko kaj Azio. En ambaŭ mondpartoj la urbanaro multobliĝos inter la jaroj 2000 ĝis 2030 kaj pliiĝos je 1,7 miliardoj. Tio superos la sumon de la loĝantaroj de Ĉinio kaj Usono. Dum tiu periodo la nombro de urbanoj en Azio kreskos de 1,3 ĝis 2,64 miliardoj, en Afriko de 294 ĝis 742 milionoj kaj en Latin-Ameriko kaj la regiono de la Kariba Maro de 394 ĝis 609 milionoj.

La jaro 2008 iĝos grava turnopunkto en la historio de la homaro. En tiu jaro la „pesilo” de la monda loĝantaro unufoje devios de kamparo al urbo. Ĝis 2030 la loĝantaro en urboj pliiĝos ĝis 5 miliardoj kaj atingos 60 % de la monda loĝantaro.

Nombro de malriĉuloj pliiĝos

La raporto montras, ke la progreso de urbiĝado ĉiam akompanas problemoj pri malriĉo, loĝado, medio ktp. La plej elstara problemo estas la malriĉulaj kvartaloj. Nuntempe la kvartalaĉoj en urboj disvastiĝas pli rapide ol en kamparoj. Almenaŭ unu miliardo da urbanoj, tio estas triono de la tuta loĝantaro, vivas en tiaj kvartaloj. Pli ol 90 % de la urbaj malriĉuloj vivas en la disvolviĝantaj landoj. La plej altan proporcion havas suda Azio; post ĝi sekvas orienta Azio, la landoj sude de Saharo kaj Latin-Ameriko. Al tiuj homoj mankas iu ajn ŝanco enprofesiigi



TREY MENEFF

kaj iuj eĉ ne havas fiksitan loĝadreson.

En la plimulto de la urboj malriĉuloj havas averaĝan aĝon sub 25 jaroj. Ili plej facile estas trafataj de senlaboreco kaj influataj de doktrinaj religioj. De la antaŭurboj de Ĝakarto en Indonezio ĝis la kvartalaĉoj de Egiptio videblas la leviĝo de iuj fundamentemaj

religioj. George Mattin, statistikisto pri loĝantaro kaj unu el la aŭtoroj de la UN-raporto, pri tio rimarkigis, ke la urbiĝado estas ŝanĝanta kaj samtempe skuanta niajn pensojn kaj ke nun por tiuj urbaj mizeruloj unu el la manieroj denove organizi sian vivadon estas kredi je ia ekstremisma religio. ►

Kvartalo kontrasto en Ĝakarto



PIKA SARI

David Galadí-Enríquez
kaj Amrí Wandel

La kosmo kaj ni

Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo
(dua plivastigita eldono).

Vera manlibro pri teoria kaj praktika astronomio,
verkita de du profesiaj astronomoj.

224 paĝoj; ilustrita; bindita; 2005

Prezo ĉe FEL: 18 eŭroj + afranko
Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

bŭtiko@fel.esperanto.be
www.retbutiko.net

aŭ ĉe via preferata libroservo

Premio Pirlot
2001

► Malriĉuloj rajtu vivi en urboj

La raporto avertas, ke la progresado de urbiĝado estas neevitebla kaj forte alvokas la diverslandajn registarojn sankcii, ke malriĉuloj rajtas vivi kaj labori en urboj. La unueciĝo de la monda ekonomio kaj la urbiĝado alportas al la urboj mem tre multajn avantaĝojn, sed tamen ĉiuj urboj ofte ne kapablas liveri sufiĉe da ŝancoj al tiuj, kiuj venas de la kamparo. Aparte virinoj estas kutime ekskluzivitaj disde la gvidanta vivado de la urbanoj. Al knabinoj mankas ebleco viziti bazan lernejon. Por solvi aŭ eviti tiujn problemojn, necesas ke registaraj organizaĵoj ĝustatempe ellaboru projektojn, por ke homoj amase enurbiĝintaj havu eblon por edukado, enoficiĝo, loĝado kaj aliaj bazaj vivrimedoj.

Por fari tion, la organizaĵoj nepre alfrontos grandajn defiojn, ĉar tio bezonas multajn riĉfontojn. Tial espreble estu intensa kunlaboro inter la diverslandaj registaroj kaj Unuiĝintaj Nacioj, sed ankaŭ estu intimaj rilatoj inter la diversaj landoj.

Urbigo en Ĉinio

La raporto emfazas, ke nun Ĉinio jam estas en la pintoperiodo de la urba ekspansio. Ĉiujare ĉ. 1,8 milionoj da kamparanoj envenas la urbojn. Tia migrado nepre kaŭzas multajn problemojn pri socio kaj medio, sed kompare kun aliaj disvolviĝantaj landoj, en Ĉinio la migrado faris kaj faras pli grandan kontribuon al la urba kresko. Alia flanko de la ĉina ekonomia prospero tamen estas la malriĉiĝo de pli kaj pli da ordinaraj ĉinoj.

La raporto montras, ke nun Ĉinio estas la centro de la monda fabrikanta industrio kun pli ol 600 urboj mezaj kaj grandaj. Preskaŭ ĉiuj fabrikoj situas en aŭ apud urboj. La registaro rezonas, ke post malpli ol dek jaroj pli ol duono de la ĉinoj, nome ĉ. 870 milionoj, iĝos urbanoj. Tiam en Ĉinio estos 83 urbegoj kun po pli ol 7,5 milionoj da loĝantoj.

Mu Binghua

www.unfpa.org/swp/2007/english/introduction.html (html) kaj www.unfpa.org/swp/2007/presskit/pdf/sowp2007_eng.pdf (pdf, 2900 kB)

Bele prezentita romano

Temas pri traduko de itallingva romano, eldonita en 1881. Tiutempe la tutnacia itala lingvo estis ankoraŭ relative nova – oni plejparte parolis aron da dialektoj, en la diversaj urboj kaj vilaĝoj. Kiel parto de klopodo establi ŝtaton italan, kun tutlanda registaro, oni samtempe klopodis unuigi la lingvon.

„Malemuloj” estas la kromnomo de familio, loĝanta en tre malgranda itala vilaĝo, en Sicilio. Kvankam la romano fokusiĝas sur la Malemuloj, ĝi ampleksas ankaŭ la vivon, pensojn kaj agojn de kelkaj aliaj familioj, parte parencaj al la Malemuloj.

Kvankam preskaŭ ĉiu persono en la romano, da kiuj estas kvindek, havas propran nomon, preskaŭ ĉiuj havas ankaŭ kromnomon. Plejofte uziĝas la kromnomoj, intermiksita kun la propraj nomoj, tiel ke la leganto facile konfuziĝas, kiam du nomoj, diversloke aperantaj, montriĝas aparteni al unusola persono. Sed feliĉige, jam komence de la verko, la tradukintoj provizis dupaĝan liston de ĉiuj personoj, dividitaj laŭ kategorioj, en kiu ĉiu persono estas prezentata kun ĉiuj siaj nomoj kaj kun nelonga priskribo. La leganto profite, kaj necese, ofte konsultu tiun liston.

La epoko de la romano estas, ĝenerale, la 1880aj jaroj. La aŭtoro detale priskribas la vivon en la vilaĝo, kun nur maloftaj mencioj pri ekstervilaĝaj eventoj. Unu el la konstantaj temoj estas la maldeziro de la vilaĝanoj akcepti la novan registaron kaj ties reĝon, impostojn, regulojn kaj leĝojn – kaj devigan militservon. Alia, plej ĉefa temo, estas la ĉiutagaj vivoj de la anoj de la malemula familio.

La malemulan familion trafas pluraj katastrofoj, fizikaj kaj emociaj. Komence bonstata, kvankam ne vere riĉa, la familio akiras sian ĉiutagan panon per fiŝkaptado kaj sporada komercado perŝipa. La unua katastrofo okazas, kiam ŝtormo pereigas la ŝipon, pose-


datan de la familio, dum ĝi veturas sur la maro. Ne nur perdiĝas la kargo, sed ankaŭ mortas ĉiuj ŝipanoj, inter ili la patro de la familio.

La valoro de la ŝipo estis granda, sed la valoro de la kargo estis pereige granda, ĉar la varo portata estis lupenoj, prunteprenita kargo, do repagenda. Per tiu unusola averio la familio perdas preskaŭ tutan sian havaĵon: la ŝipon mem, la mortulojn kaj la kapablon repagi la koston de la lupenoj. Ĝi ekiĝas malriĉa, posedanta nur sian domon, kaj sen kapablo perlabori sian panon. Samtempe ĝi perdas sian socian rangon. Ĉar en tia vilaĝo geedziĝoj estas aranĝataj de la gepatroj kaj la pago de dotoj estas gravega, subite la planitaj aŭ esperitaj geedziĝoj de la familianoj montriĝas ne plu reala espero. Dotojn ne povas ĝi pagi, kaj aliaj bonstataj familioj ne volas sin kunligi kun la subite malriĉiĝinta, nun socie malaltranga, malemula familio.

Sed homoj estas entreprenemaj, kaj malfacile la sorto ekstermas ilin. Iom post iom la familio sukcesas restariĝi, kaj, kvankam ĝi ne reatingas siajn iamajn riĉon kaj socian rangon, ĝi preskaŭ atingas tiom.

Pli-malpli simile ripetiĝas, tamen, katastrofo, kiu remalriĉigas kaj senesperigas la familion. Krome, la familio pliĝiĝas, la infanoj kreskas, kelkaj membroj mortas, la situacio ŝanĝiĝas ... Sed *plus ça change, plus c'est la même chose* (ju pli io ŝanĝiĝas, des pli ĉio restas sama).

Malmulto efektive okazas en la romano. La ĉefa trajto de la romano estas la prezentado de la ĉiutaga karaktero de la diversaj rolantoj, de iliaj pensoj, de la nerapida ĉiutaga vivo en la vilaĝo. Oni preskaŭ povus karaktere-



rizi la romanon kiel psikologian/sociologian romanon, tre lerte verkitan, kun bona stilo, sed neniel ekscite eventoplenan.

La tradukon prizorgis grupo de tri personoj, la kvalito de la traduko estis zorge reviziita de ankoraŭ du aliaj personoj. Rezulte, la stilo estas glata, la lingvaĵo klara. La tradukintoj provizis kvar antaŭparolojn, kiuj detale informas pri la personoj de la romano, pri la geografia, historia kaj lingva kunteksto de la romano, pri la aŭtoro kaj pri la tradukado kaj la reviziado. Krome, ili donis 272 piednotojn tra la romano, por klarigi aludojn, komprenigi la sencon de parolturnoj kaj ĝenerale orienti la leganton. Tiuj notoj, plus la antaŭparoloj, estas modelo de prezento por internacia legantaro.

Ensume: tre enuiga verko por la leganto, kiu volas ekscitan aventurromanon; tre impona prezento de la vivo en itala vilaĝeto dum la malfrua parto de la 19a jarcento por la leganto, kiun interesas la ĉiutaga vivo de homoj.

Donald BROADRIBB

Giovanni Verga: La Malemuloj. Tradukis Giancarlo Rinaldo, Anselmo Ruffatti kaj Paola Tosato. Eld. Edistudio, Pisa, 2006. 261 paĝoj kuditaj. ISBN 978-88-7036-076-9.

Prezo ĉe FEL: 19,80 eŭroj.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Tlf. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33; rete: retbutiko@retbutiko.net; skajpe fel-monato aŭ per www.retbutiko.net.

Ezop(ec)aj fabloj el Japanio

Jen ĉarma libreto, bele ilustrita, kiun eblas eklegi sufiĉe rapide post fino de baza kurso pri Esperanto. Precipe por japanlingvuloj estas utile, ke piednote troviĝas klarigoj pri pluraj vortkunmetaĵoj kaj esprimoj ne tuj unuarigarde travideblaj, kiel, ekzemple, „griz-iĝ-ant-a” aŭ „kiel eble”. Librofino oni trovas vortoliston Esperanto-japanan.

Temas pri kolektaĵo de 50 mallongaj rakontoj, fabloj, en kiuj tre ofte rolas bestoj, sed ne nur. Enhave ili estas tute tradiciaj, kun simpla moralaĵo ĉe la fino. La stilo estas klara.

La ĝenro devenas de iom enigma figuro el la helena literaturo, Ezopo, pri kies vivo nenio estas vere sciata. Li verkis siajn mallongajn rakontojn proze, en senornama stilo; ankoraŭ nun lernantoj pri la klasika helena lingvo ofte uzas liajn tekstojn sufiĉe frue. La latina Phaedrus (Fedro) kiel unua famigis la ĝenron en formo de poemetoj. Konataj daŭrigantoj estas, inter aliaj, Jean de la Fontaine en la franca, Krilov en la rusa, kaj Kalocsay en Esperanto.

Al tiu ĉi tradicio apartenas ankaŭ ĉi tiu libreto de Nakagaki.

Gerit BERNELING



Nakagaki Kojiro: *50 Fabloj de Ezopo*. Nova reviziita eldono. Eld. Japania Esperanta Librokooperativo, Toyonaka-si, 2004. 87 paĝoj. ISBN 4930785510.



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ aŭfranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

ANONCETOJ

AIS San-Marino raportas pri sia konferenco SUS 30: www.ais-sanmarino.org.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego, programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provexemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Esperantistaj foto- kaj filmamatoroj, vizitu www.ipernity.com.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0255-6587

LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

gazeto@aol.com

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj


Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La jaro 2008

Via poŝamiko dum la tuta jaro 2008 (kaj pli)



Poŝkalendaro

- kun spaco por fari notojn,
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

Enciklopedieto

- kun la ŝtatoj de l' mondo,
- kun ĉefurboj, loĝantoj, surfaco ktp ktp,
- kun indiko kiel telefoni el kaj al eksterlando
- kun radioprogramoj en Esperanto
- kaj multe pli

Mendu ĝin tuj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000, Antwerpen, Belgio
retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto
(vidu liston kaj prezojn en p. 4).

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun por la 3 venontaj jaroj (5 % da rabato) aŭ por la 5 venontaj jaroj (10 % da rabato!).